

kas, ke Esperanto neniam atingas la staton de la finna aŭ turka lingvoj, ĉar ĝi uzas prepoziciojn anstataŭ kazosufiksoj kaj ĝi havas apartajn adjektivojn de posedo. Aliaflanke la fakto mem ke la sufiksoj en Esperanto ofte funkcias kvazaŭ radike, apartigas ĝin de la finna aŭ turka, en kiuj la sufiksoj estas ĉiam „ligitaj formoj”. En unu rilato Esperanto montras la fleksian karakteron de la hindeŭropaj lingvoj. En la skribo ni povas facile distingi ekz. la vortklasajn sufiksojn -o kaj -a de la pluralsufikso -j kaj la akuzativsufikso -n, sed en la parolo ni fakte faras el -oj kaj -aj unuecajn diftongojn. Do, se ni volas, ni povas difini Esperanton kiel meze fleksian, malforte aglutinan lingvon.

Esperanto havas do entute la karakterizajn trajtojn de la hindeŭropaj kulturlingvoj. Ni jam rimarkis la grandajn diferencojn, kiujn montras aliaj lingvotipoj. La esprimbezonoj kaj esprimkapabloj de la popoloj estas mirinde diversaj. Kelkaj nord-Amerikaj lingvoj, ekz. *minomini* studata de Bloomfield, havas specialajn formojn de la verbo por indiki la surprizon kaj ankaŭ la seniluziigon, emocioj, kiujn ni kutime esprimas per la voĉtonoj. La kartvela de Georgio distingas inter verboj de ago kiel „mi skribas” kaj verboj de sperto, ekz. por „mi aŭdas” oni devas diri proksimume „al mi sonas”. Kiel Bloomfield montras, en la jam menciita *Tagalog* la rakonta frazo, ekz. mi tranĉas lignon, havas kvar diversajn formulojn. Se oni atentigas al la subjekto aŭ aganto, oni diras laŭvorte: „mi estas tranĉinto de ligno”; aliaflanke, se oni volas esprimi la pasivan formon de Esperanto „la ligno estas tranĉita de mi”, oni diras „la tranĉitaĵo de li estas la ligno”. Krome oni havas specialajn frazotipojn por akcenti la lokon aŭ la parton de la ligno, el kiu oni tranĉas kaj por la instrumento, per kiu oni tranĉas. En Esperanto ni ne modifas la konjugacion de la verbo laŭ tiuj konkretaj ideoj.

Resume, mi estas tentata kompari la diversajn tipojn de lingvaj strukturoj al la diversaj manieroj, laŭ kiuj oni povas konstrui muron aŭ domon. La nuntempa ĉina lingvo aspektas kiel tiuj ciklopaj muroj, en kiuj grandaj blokoj el nefasonita ŝtono staras unu apud la alia en difinita ordo sen mortero kaj preskaŭ sen elstarajoj. En la polineziaj lingvoj oni jam vidas kelkajn ligilojn inter la ŝtonblokoj. Tiuj ligiloj multobliĝas en la malforte sintezaj hindeŭropaj lingvoj kaj ankaŭ en la afiksemaj finna kaj turka kaj en la vokalalternoj de la semidaj lingvoj. La enkorpiĝaj aŭ „polisintezaj” lingvoj kiel la baska aŭ la eskima ne tiom similas al ŝtonkonstruaĵoj kiom al domoj kunmetitaj el interplektitaj branĉoj, kiuj siavice eĉ estas kovritaj per argilo tiel ke oni devas forte klopodi por disigi kaj priskribi la erojn, el kiuj ili estas konstruitaj.

Mi nun venas al la fino. Restas nur diri, ke mi ĉiam trovis Esperanton taŭga komparilo kaj analizo por reliefigi la apartajn trajtojn de aliaj lingvoj. Eble la uzo, kiun mi faris de Esperanto en ĉi tiu prelego, nur konfirmos vian propran admiron al la valora instrumento por lingvaj studoj, kiun D-ro Zamenhof metis en niajn manojn.

LA PROBLEMO DE LA LOGANTARO EN JAPANUJO

de Prof. D-ro HIDEO YAGI, Okayama Universitato.
Prelego en Internacia Somera Universitato, Haarlem 1954.

1. Antaŭparolo.

Japanujo estas lando, kiu havas monde faman naskopovon. Post la dua mondmilito ĝi perdis 45 % da landospaco kaj fariĝis malgranda lando en formo de piza ŝelo.....ne, ĝi estas jam pizo mem en la Ekstrema Oriento.

Sed la multiĝo de loĝantoj daŭras senĉese, ĉar homoj revenas el la kontinentoj amase al sia hejmlando, soldatoj revenis ankaŭ kaj la monde fama naskiĝforto daŭras senŝanĝe. Kion fari en la estonteco? Tio estas la demando ne nur por ni Japanoj, sed ankaŭ por la tuta mondo.

Estas vero, ke la problemo estas malfacila, granda homa afero, kiu rilatas al plej diversaj flankoj,nome, politika, socia, ekonomia, popolhigiena, medicina, k.a.

Mi ne estas en la pozicio diskuti la demandon de la politika flanko, nek de la ekonomia kaj alispecaj flankoj. Ĉar mi estas kuracisto, mi povas priparoli la aferon nur de la medicina vidpunkto. Pro tio, mi volas paroli 1. pri la vivostatistiko de la japana popolo, 2. pri la naskolimigo de diversaj metodoj, inter kiuj sin trovas japanaj elpensoj kaj 3. pri la antaŭvido de ĝia estonta stato.

2. Tro multe da homoj.

En la 2a de Januaro 1954 nia Regnestro en Tokio akceptis Novjaran saluton de urbanoj de Tokio en sia palaco. La palaco ordinare estas fermita al la publiko kaj tial la popolo volis uzi tiun bonan ŝancon por ekvidi ĝin, enirante la lokon, kiu estas respektata kaj al kiu sopiras la tuta popolo japana. Por saluti la Geregnestrojn kaj por rigardi la internon de la palaco, homoj komencis eniri de la 9a matene kaj entute 381 250 vizitis en longa vico da svarmantaj grupoj ĝis la 2a 15 posttagmeze, kiam subite okazis granda tumulto. Unu virino maljuna falis ŝanceliĝante kaj je tiu momento la sekvantaj homamasoj ankaŭ ŝanceliĝis, renversiĝis, falis unuj sur aliajn kaj amaso da homoj kunpuŝiĝis en unu momento. Ekestis senorda haoso nesavebla, en kiu 16 mortis kaj 63 vundiĝis. Vi eble ne povos eĉ imagi tian strangan scenon. Estas certe, ke tiu ĉi rakonto montras, kiom multe da homoj vivas en Japanujo. La kaŭzo estas ke la nombro de loĝantoj estas tro granda.

Nun mi volas rakonti al vi la duan ekzemplon. Ĉu vi konas la faman verkon „Malgrandaj Virinoj” de Louisa May Alcott (1832-1888)? Ĝi estas rakonto de 4 fratinoj en la aĝo de 20, 19, 17 kaj 13 jaroj. Antaŭ nelonge, naturkolora kinfilmo de MGM-Kompanio Usona estis importata en Japan-

ujon. Direktoro de kinoteatro elpensis tre spritan ideon por reklamo. Aperis anonco en tagjurnaloj por varbi kontraŭ premio 4 fratinojn, kiuj estas fraŭlinoj kaj havas ĝuste la saman aŭ plej proksiman aĝon kiel en la originalo. Li konjekte kalkulis maksimume 100 kvaropojn da fratinoj. La tago venis. Kiam la direktoro ekrigardis tra fenestro de sia ĉambro eksteren sur la homamasoj, li preskaŭ svenis, vidante per siaj propraj okuloj grandan vicon de junaj fratinoj, kiuj formis kvarope longan kaj senfinan procesion.

Venis 1 000 kvaropoj, t.e. 4 000 fraŭlinoj! La unua premio estis donacita al fratinaro, kies aĝaranĝo estis 20, 18, 15 kaj 13!

Se vi havus la eblon, bonvolu fari tiun saman provon. Mi scivolas kiom da fratinaroj vi sukcesos trovi en via urbo.

3. Lando kaj popolo.

Mi rakontis al vi ĉi tiujn novaĵojn por sciigi vin kiel homoj superplenigas la landon, kiom multe da loĝantoj troplenigas la teron kaj tiu homa remburigado estas ĉiam kaj ĉie temo de diskutado en nia lando.

La nombrado en 1953 raportas ke la tuta enloĝantaro de Japanujo tiam estis ĉirkaŭ 87 200 000, kaj la „natura plimultiĝo“ de tiu jaro estis 1 090 000. Oni povas supozi ke post 17 jaroj la japana loĝantaro atingos cent milionojn. Mi permesas al mi citi kelkajn komparojn:

Finujo	460 milionoj
Hindujo	370 „
Sovetunio	190 „
Usono	160 „
Japanujo	87 „

Kompare al Japanujo Finnlando havas preskaŭ la saman areon sed nur 4,1 milionojn da loĝantoj kaj Svedujo, kiu estas iom pli granda (20%), havas 7,2 milionojn.

Tiuj ciferoj montras al vi, kiom multaj homoj estas kunpremitaj en tiel mallarĝa spaco, preskaŭ sufokante unu la alian.

Kiel solvi la demandon? Tio estas sendube malfacila sed tre grava afero, kiu frontas nian popolon. La Registaro kaj precipe la Oficejo por Publika Sano sin okupas serioze pri tiu ĉi temo kaj ankaŭ multaj institucioj, ĉu oficialaj aŭ privataj, aliĝas al tiu laboro.

Aldone al tia tromultiĝo de homoj, la japana popolo havas duan suferon, ne malpli gravan ol la sufero pri troa loĝado. Tio estas la ĉiujara natura akcidento. Ventego, akvego kaj tertremo difektas senĉese la landon ne mal multe. La perdo kalkuliĝas en unu jaro je 800 milionoj da usonaj dolaroj. Forblovado de arbaroj, senfruktigo de rizkamparo, detruo de domoj kaj morto de homoj aŭ dombestoj, ĉio estas nenio alia ol la natura sufero de la popolo.

Por la japana nacio tiu „natura atako“ estas la plej danĝera, ne la atako de malamikoj.

Ciam turmentata kaj minacata, sed tamen hardita, estas la stato de la japana popolo. Malgraŭ tio ĝi montras grandan plimultiĝon de loĝantoj.

Ni ne povas plu plilarĝigi la landon „horizontale“. Ni do devas pripensi vivi „vertikale“, tio estas vivi ĝis la pintoj de montoj. Veturante en vagonaro tra la kamparoj, vi vidas multajn domojn sur la montoj. Utiligi la maron kaj gajni marproduktaĵojn estas ankaŭ por ni tre necesa laboro. Vivi en la ŝelo de pizo signifas maksimuman utiligon de sia propraĵo. Sed tamen estas limo je tio. Finfine venos al nia buŝo la malsato. Jen la problemo de naskolimigo aperas antaŭ ni en sia plej granda amplekso.

4. Naskolimigo.

Naskolimigo estas vaste konata en civilizitaj landoj. La ideo kaj praktiko disvastiĝas kaj bezonas jam nenium komenton. En la homa historio oni vidas en la primitiva epoko mortigon de novnaskitoj en la momento, kiam ili estas naskitaj kaj ankoraŭ ne komencas krii. Tio estis vera homomortigo kaj tia sovaĝa konduto jam ne ekzistas plu. Puno severa minacas kompreneble. En pli posta epoko disvastiĝis mortigo de fetoj kiel rimedo de naskolimigo, nome abortigo de fetoj dum gravedeco. Operacia interrompo de gravedeco. Tio estas punata, se ĝi estas farata sen serioza medicina kialo, kiel ekzemple por savi la patrinan sanon.

La abortigo pure medicina rilatas tiamaniere nur al la sano de graveda virino, kaj alia kategorio de abortigo estas pravigita kiel eŭgenika, kontraŭmorala, jurmedicina ktp. Ekonomia motivo ne estas prava. Tiun malpravan abortigon nuntempe nia popolo suferas vole-ne-vole kiel rimedon de naskolimigo. La nombro de artefarita abortigo en la jaro 1952 estis 800 000. Krom tio aliĝas natura abortigo kaj entute ĉirkaŭ la duoblo pro interrompiĝo de la feta kresko okazis en nia lando. Tio estas unu kaŭzo por la malplimultiĝo de la naskonombro en la lastaj jaroj, nome en 1953 ĝi estis 21,4 po mil, kvankam ĝi estis en 1947 34,3 po mil. Sekve de tia multiĝo kaj malmultiĝo la saldo estas nuntempe ankoraŭ senĉesa multiĝo de loĝantoj, ĉar mortokazoj malmultiĝas aliflanke post la milito.

Ni forigu tiun abomenindan fetomortigon aŭ abortigon kiel eble plej frue kaj pripensu la trian aferon: la naskolimigo en ĝia vera senco, celkonscia regulado de la familia nombro aŭ intencita evito de gravediĝo. Tiu tria metodo estas kompreneble la vera naskolimigo, kiu disvastiĝas tra la tuta mondo.


5. Diversaj metodoj.

Kiu metodo estas la plej bona? Tion volas scii ĉiu persono, sed efektive neniu scias, nur Dio scias. Diversaj metodoj estas proponitaj. Kelkaj ŝatas

unu metodon kaj aliaj alian. Ĉu ekzistas metodo natura? Farante kontraŭ-naturan aferon, neniu natura metodo povas ekzisti. Ni nur penas uzi metodojn, kiu estas simpla, sendanĝera kaj eĉ ekonomia. Mi parolu pri kelkaj metodoj.

En Eŭropo kaj Usono disvastiĝas, kaj ofte samtempa uzo de ambaŭ, spermom, pesaro aŭ diafragmo forniksa, kaj ofte samtempa uzo de ambaŭ. Sed en nia lando la rezultato de tiu ĉi progresinta metodo estas ne tiel bona kiel en aliaj landoj. Kial? Unue, la plimulto de la Japanoj ankoraŭ ne havas precizan anatomian konon de la lokaj partoj, nur malmultaj personoj kiel esceptoj povas uzi ĝin, la tiel nomataj „civilizitaj” homoj. Due, la konstruo de domoj kaj ĉambroj estas tute malsamaj ol en Eŭropaj landoj. En la dormo-ĉambro enlitiĝas ne nur la geedzoj, sed ofte litoj de aliaj familianoj troviĝas en la sama ĉambro. La vando inter najbaroj ĉambroj ne estas fiksa kiel en Eŭropo kaj tial la bezonata manipulado ĝenerale ne plaĉas al la plimulto de la sinjorinoj. Duŝo vagina, ŝprucigo kun varmeta akvo aŭ kun medikamento mortiganta spermerojn, ne plaĉas ankoraŭ al la publiko pro tiu dua kaŭzo kaj ĝia efiko estas do malbona ĉe ni.

Al Japanoj devas esti japane taŭgaj metodoj. Ĝia eltrovo estas sendube la tasko por ni ginekologoj.



Bildo 1. Monata ciklo de virino. F: fekunda, S: sterila, RS: relative sterila (teorio de D-ro Oginio)

6. Teorio de Oginio.

D-ro Oginio estas japana ginekologo, tre fama pro sia studo pri la funkcio de la ovario, nome pri menstruo kaj ovoeligo el la ovario, nomata „ovulado”. Lia teorio klarigas ke homa ovo eliĝas el la ovario 12-16 tagojn antaŭ la sekvonta menstruo. Sekvis lian teorion D-ro Knaus kaj nun oni konas la teorion kiel la „Oginio-Knaus teorion”. Ĝi estas ĝusta kaj oni volas utiligi ĝin al fekundiĝo kaj ankaŭ al nefekundiĝo homa. Laŭ ĝi estas prezentita jena diagramo de la monata ciklo virina (bildo 1), en kiu la tempo 12-19 tagojn antaŭ la sekvonta menstruo estas *periodo de fekundiĝo* (F en la diagramo), ĉar oni supozas la vivdaŭron de la spermeroj je 3 tagoj. Ĉirkaŭ 10 tagoj antaŭ la menstruo estas *periodo de nefekundeco aŭ sterilo* (S en la diagramo) kaj 6 tagojn post la fininta menstruo estas tempo de *relativa sterilo* (RS en la diagramo). La monata ciklo ne estas egala en diversaj rasoj, ekzemple Japanoj havas ciklon de 30 tagoj, Germanoj iun de 28 tagoj. Por utiligi tiun diagramon estas do necese ke la ciklo, kiu ripetigaĵas regule kun la sama longo, devas esti observata kaj precize konata de la virino mem. Sed en la praktiko okazas ofte malsukceso. Kial? Unue, la vivdaŭro de la spermeroj ne estas ankoraŭ bone klarigita. Oni supozas ke nur 3 tagoj, sed efektive ĝia vivdaŭro povas esti pli ol 3, eĉ 7 aŭ 10 tagoj! Tio kaŭzas eraron en la kalkulo, kompreneble. Due, la ciklo mem povas ŝanĝiĝi pro diversaj faktoroj, ĉu korpaj aŭ spiritaĵaj. Tial, se ĝi aliĝas, la diagrama mezuro fariĝas erara. En la praktiko la utiligo de tiu ĉi ciklo estas limigita nur al tiuj personoj en kiuj la periodo neniam ŝanĝiĝas kaj kiuj ĉiam atente rigardas sian periodon. Ĝenerala popolo ne povas uzi ĝin bone.


Tamen mi povas diri ke ĝi estas metodo plej simpla kaj eĉ plimalpli natura. Neniu medikamento bezoniĝas. Neniu aparato estas uzenda. Principe ĝi estas bona, sed reale ĝi ne estas ĉiam kontentiga.

7. Japanaj elpensoj.

Embarasite de la fakto, ke en Japanujo la naskolimigo estas urĝe bezonata kaj tamen ke troviĝas neniu bona metodo aplikebla por la ĝenerala publiko, kelkaj japanaj kuracistoj penis elpensi novan aŭ modifi aliajn metodojn. Nun mi volas citi al vi du el ili. Tiuj du metodoj estas nuntempe uzataj kiel eksperimento kaj ties rezultato, mi kredas, povos kontribui al monda referenco en la studado de tiu ĉi temo.

La unua estas *ringo en la utero*. Ĝi estis farita antaŭe de germano Graefenberg, D-ro Ota, japana kuracisto, modifis ĝin, aldonante kernon al la ringo (vidu bildon 2).


Ĝi estas malgranda ringo el mola metalo (oro, plateno k.a.) aŭ el *polivinila plasto*. Mezuro 2, 2,5 aŭ 3 cm en diametro. Kuracisto mezuras la grandecon de la utera kavo kaj enmetas ringon de taŭga grandeco. Ĝi povas resti 2 plenajn jarojn se neniu plendo aperas. Laŭ raporto de kura-



Bildo 2. Ringo en la utera kavo (modelo de D-ro Ota)

cistoj, ĝia efiko eviti gravediĝon, estas meznombre 70 %. Komplikaĵo kiel sangado, doloro, leŭkoreo k.a. aperas kelkfoje kaj tiam oni povas forpreni ĝin facile. Se neniu plendo aperas dum la unua ciklo post enmeto, ĝi povas sendanĝere restadi ĝis la tempolimo de 2 jaroj, kiam kuracisto devas ŝanĝi ĝin, ekzamenante, ĉu la metalo oksidiĝis aŭ ne. Patologia ŝanĝiĝo, kiun oni povas timi, ne ĝenerale okazas. La endometrio¹⁾ restas sana kaj post kiam la ringo estas forprenita, la utero povas taŭgi al nova gravediĝo tre baldaŭ. Kvankam ĝi ne estas ideala, nek natura metodo, ĝi taŭgas almenaŭ al la japana vivo. Tio pravigas tiun ĉi metodon.

La dua estas pure japana elpensajo (bildo 3). *Valveto* en la kanalo cervika.




Bildo 3. Valvo en la cervika kanalo utera (tubeto el mola kaŭĉuko kun pipo)

¹⁾ endometrio = utera mukmembrano (Briquet, Medicina vortaro, 1932). Red.

elpensita de D-ro Iŝizaki, molega kaŭĉuka tubo de longeco de 2 cm kun pipo de 1.5 cm. La pipo estas enmetata de kuracisto en la kanalon cervikan, t.e. la suba parto de la utero, kaj la maldika tubo pendas en la fundo vagina, nomita fornikso. La menstrua fluidaĵo elfluas sen baro, sed spermatozooj ne povas penetri en uteron. Efiko: ĉirkaŭ 60 %. Malsukceso devenas de ĝia defalo, sed alia malbona komplikaĵo ne akompanas.

La tria estas *polivinila spongo* ĉe la vagina fundo. Ĝis nun oni uzis kaj uzas en Eŭropo spongon por eviti gravediĝon, sed pro ofta malsukceso la nomo „certiga spongo“ ŝanĝiĝas en la nomon „malcerta spongo“. Japana modifo estas montrata en bildo 4. La materialo estas polivinilo kaj la formo adap-



Bildo 4. Spongo polivinila ĉe la fornikso vagina

tiĝas al la fundo de la vagino. Ĝi estas oportuna por virino, ĉar ŝi mem povas enmeti aŭ forpreni ĝin laŭbezone, sen helpo de kuracisto. Pro tio ĝi estas populara, kompare kun la antaŭaj 2 metodoj, kiuj bezonas kuracistan helpon. La efiko estas ĉirkaŭ 60 %.

Mi volas aldoni tie ĉi sovetan metodon, kiun praktikas kelkaj kuracistoj japanaj. Ĝi estas *ŝmirado de joda tinkturo* en la uteron. Kuracisto ŝmiras unu aŭ du fojojn ĉiumonate kaj korodas la mukmembranon de la utero por malhelpi gravediĝon. Efiko estas raportita ĉirkaŭ 60 %.

8. Aliaj novaj metodoj.

Ĉu ne ekzistas alia pli efika, pli simpla kaj scienca metodo? Estas la deziro de ĉiu, kiu volas eviti naskon. S-ino S a n g e r raportis, kiam ŝi vizitis Japanujon por organizi „ligon por planita gepatreco“, ke en Usono produktiĝas tute nova medikamento el vitamino P aŭ *hesperidino*, kiu konservas la kovrilan tavolon de la ovo kaj malhelpas al ĝi kuniĝi kun spermatozooj. La ova kovrilo estas solvata per ago de *hialuronidazo*, fermento, kiun hesperidino

kontraŭstaras. Sanger aldonis ke eksperimento sukcesis jam en 300 paroj, kiuj trinkis la medikamenton, sed plia observo estas necesa.

Jen alia japana eksperimento de D-roj Ŝirai kaj Iida el Tokushima. Ili penas krei artefaritan flavan korpon en la ovario, injektante trofoblastohormonon, t.e. preparaĵo el la homa placento. La medikamento akcelas la funkcion de la „flava korpo“, kiu povas malhelpi eligadon de ovo aŭ ovuladon. Unu injekto monata aŭ en unu ciklo. Ĉe bestoj oni sukcesis jam, sed ĉe homoj, la dozo kaj tempo ankoraŭ ne estas determinita kaj bedaŭrinde ĝi apartenas al la estonto.

9. Konkludo.

Mi rakontis sufiĉe longe pri la stato de tro multa nombro de loĝantoj en la nuntempa Japanujo kaj diris ke pro tio japanoj deziras mem kontraŭstari al tiu aktuala problemo, serĉante ian solvon. Kuracistaj kontribuoj pruvas ke ankaŭ ili laboras por tiu celo per sia medicina kapablo. Sed de la medicina vidpunkto, mi diras, neniu kontentiga metodo estas ĝis nun havebla.

Metodo ideala kaj samtempe efikoplena, tia ne povas ekzisti „teorie“, ĉar la afero de evito de gravediĝo mem estas ago kontraŭnatura, kontraŭ la Dia volo. Dio permesas nur abstinon, se oni ne volas fekundiĝi.

Metodoj varias laŭ landoj kaj nacioj. Iu metodo, bona en unu lando, ne povas esti importata en alian kun la sama efiko. Tio estas vero. Kaj ni, Japanoj, do devas peni utiligi tiujn metodojn, kiuj estas taŭgaj al nia vivo.

Gesinjoroj, ni paroladis pri aferoj malĝojaj, mi plendis tro multe kaj mi timas, ĉu mi eble tedis vin.

Ni estas Esperantistoj. Nia Majstro Zamenhof havis en sia idealo altan homaman principon: la „Homaranismo“. Unu mondo, unu familia rondo kaj unu helpa lingvo! Homoj povas loĝi en ĉiu loko de la mondo, kiel pacaj laboristoj. Homoj povas veturi ĉien ajn kaj esti bone komprenataj ĉie ajn. Tia Esperantujo certe estas utopio en malproksima estonteco, sed almenaŭ Esperantistoj povas kompreni la idealon kaj pro tio konsenti en la japana malfeliĉo. Mi ne volas peti simpatian de alilandanoj. Mi nur volas konigi la nunan staton kaj samtempe malkaŝi la belan idealon de la tuta homaro, kiu estas sendube komuna por ĉiu nacio kaj kiu ĉiam kreas al Esperantistoj forton batali por la lingvo Esperanto!

RECENZO KAJ BIBLIOGRAFIO.

408.92:413

Plena Vortaro de Esperanto, 4-a eldono, 512 paĝoj plus **Suplemento** 64-paĝa, formato 98 × 135 mm²; tole bindita; prezo: us. \$ 3.—; eldonaĵo de S.A.T., 67 avenue Gambetta, Paris-20.

Ĉi tiu 4-a eldono, same kiel la 3-a, estas fotografa, ofseta represo de la 2-a eldono de ĉi tiu ĝenerale konata, ne-oficiale aŭtoritata Esperanto-vortaro. Nova estas nur la 64-paĝa aldonajo kiu enhavas multe da vortoj el la poezia fakvortaro de Parnasa Gvidlibro de Kaloscay kaj Waringhien, krome multajn fakajn terminojn, kaj terminojn por multaj freŝdataj aperaĵoj (ekz.: *cibernetiko*, *buldozo*, *eskalimunaj nilonŝtrumpoj*, *jipo* (Kon-Tiki: ĝipo!), *napalmo*, *nazio*, *skotero*).

Plena Vortaro en la komenco de la tridekaj jaroj estis la libro kiun mi plej ofte konsultadis. Preskaŭ ne pasis tago en kiu mi ne serĉis ion en ĝi. Kaj dum mi serĉis kaj foliumis, kompreneble trafis mian atenton ankaŭ aliaj vortoj, mi legis iliajn difinojn, kaj tiamaniere mi akiris relative grandan vortoscion. Nu, ĉi tiu 4-a eldono kredeble por neniu ludos similan rolon, ĉar la malgrandeco de la literoj kaj la okulstreĉa legado vere ne invitas al iom longedaŭra legado. Foje mi devis eĉ miopigi min surmetante duan paron da okulvitroj (tridioptriaj) por certiĝi pri ia litersekvaĵo (ekz. ...*ili*...). Tamen oni ne povas nei ke la preso estas tre neta kaj meritas ĉian laŭdon. Sed la reduktio de ĉiuj longoj al 2/3 de la originala amplekso praktike signifas ke la limo de legebleco estas atingita. La avantaĝo estas la poŝformato de ĉi tiu vortaro (105 × 140 × 18 mm³) kaj kredeble malpli alta prezo. La papero estas maldika kiel tiu sur kiu presiĝis ĉi tiu recenzo.

Kaj nun pri la enhavo de ĉi tiu 4-a eldono de Plena Vortaro. Fakte sufiĉas paroli pri la aldonajo, kies enhavo Prof. Waringhien ĉerpis el multe pli ampleksa materialo disponebla.

Rilate al la difinoj mi devas rimarkigi ke tiuj de fakaj terminoj ĝenerale estas pli bonaj ol tiuj en la ĉefa parto, sendube pro tio ke pluraj fakuloj prizorgis ĉi tiujn fakajn terminojn kaj iliajn difinojn. Tamen kelkaj difinoj ŝajnas al mi kritikindaj, ekz. tiuj pri *depresio*, *gaspedalo*, *humida*, *cipselo* (latina nomo *Apus*, anstataŭ *Cypselus*), *gasometro*, (sub *metro*, komparu kun *gasometro* kiel ne kunmetita vorto en la ĉefa parto de la vortaro), *termostato*, *rubekolo* (ne: „malgranda specio“, eventuale: „malgrandula specio“), *seleno* (ne: lumsentivaj ecoj, sed: lumsentiv(ĉ)co), *sonstreko* (misuzo de „efekto“, cetere ankaŭ de „streko“), *tropeolo* (el familio de tropeolacoj, ne de geraniacoj), *vitaminoj* (jam ne ĝenerale, „de malbone konata kemia konsisto“ kaj bezonataj en pli grandaj ol „infinitzimaj kvantoj“), *zostero* (ne „specio de algo“, sed planto el la fanerogama familio de potamogetonacoj). Notinde estas ke la vortoj „*paniklo*“ (en la difino de „*paduso*“) kaj „*operkulo*“ (en la difino de „*pilĉardo*“) mem ne estas